



Kio estas

Oomoto



Oomoto do Brasil

Kio estas _____

Oomoto

Oomoto estas religia organizo, kreita de la vera
Dio por doni vivĝojon kaj vivforton al la homoj
kaj por konstrui sur la tero la pacan kaj
trankvilan mondon sen antagonismoj.

Oomoto estas Ŝintoa Religio

Ŝintoismo

ŜINTOO LAŬLITERE SIGNIFAS Dian Vojon. Ĝi estas enlanda kredo de la japana popolo, konsistanta en pia adorado al Dio kaj dioj (bonaj spiritoj).

Ekde la plej malproksima antikveco ili estis rigardataj kiel naturaj fenomenoj: la suno, la luno, la montaroj, la riveroj, la arboj, la rokoj ktp, nome Ŝintoismo estas religio tre koncerna al la naturo.

Ŝintoismo dividiĝas en kvar malsamaj tipoj:

- Ŝintoismo praktikata de la Tennoa Imperia Familio;
- Ŝintoismo bazita sur propraj temploj (Ili ne havas fondinton kaj instruojn);
- Ŝintoismo rilatanta al la tradicioj de la japana popolo, heredata de generacio al generacio;
- Kjoha-Ŝintoo –Tiuj posedantaj proprajn Fondinton kaj Instruojn.
- En tiu ĉi kategorio inkluzivas, krom Oomoto, **Tenrikjo, Sejĉo-No-Je, kaj Mesiana Eklezio.**




Oomoto

signifas


“Grandan Originon”

La Grandan Originan Dion de la Universo

Origino de Sejĉo-No-Je kaj Meslana Eklezio devenas el Oomoto



Postparolo de la Fondinto de Sejĉo-No-Je kaj de Mesiana Eklezio




Masaharu Taniguchi
fondinto
de Sejĉo-No-Je

MASAHARU TANIGUĈI FARIĜIS oomotano en 1918 kaj translokiĝis al Ajabe en la printempo de la sekva jaro; jarojn poste li fondis sian novan eklezion, **Sejĉo-No-Je**. Li estis imprese allogata de *Ĉinkon-kiŝin*¹ kaj de la ideo pri rekonstruo de la mondo. Tiutempe li decidis vivi kiel mizerulo; alnomante sin la *Francisko el Oomoto*, li elmontris mirindan talenton en la reklamagado de Oomoto.

Mokiĉi Okada, kiu laboris energie en Tokio kiel estro de Oomori-filio de Oomoto, poste ankaŭ fondis sian organizon (Mesiana Eklezio).

Ekde la komenco Oomoto kutimis distribui amuletojn kiujn nur la Fondintino aŭ ŝia posteulino rajtis skribi, sed Okada kaŝite ekproduktis ilin por disdoni al la membroj de sia filio. La onidiro ekdiskoniĝis atingante la direktorojn, kiuj kolere alportis lin antaŭ Onisaburon. Post kiam li aŭskultis ĉiun el la direktoroj aparte, Onisaburo per gesto venigis Okadan antaŭ sin. Tiu ĉi riverenciis lin plej respektate, atendante kun rezigno la eksplodon de lia kolero. Onisaburo do mallaŭte parolis ĉe lia orelo tiel ke neniuj povos aŭdi: *“Kiel vi vidas, ili estas ofenditaj; ekde nun estu pli zorgema; faru*



Mokiĉi Okada
Fondinto de
Mesiana Eklezio


¹ **Ĉinkon** estas sankta metodo celanta plene vekti la funkciojn de la homa praanimo. **Kiŝin**, estas la spirita stato dum kiu la homa animo, pere de la interna fluado veninta rekte el la dia esenco, harmoniiĝas kun la Origina Granda Dio.

ĝin kiel eble plej sekrete”.

Poste jam kiel gvidanto de sia religia organizo, Okada emociite rakontis ĉi tiun fakton: *“Mi neniam pardonus se unu el miaj kredantoj same agus kiel mi. Nia Paĉjo estis ja grandanima! Ho! Laŭdata estu nia Paĉjo!”.*

Aikido ankaŭ devenas Oomoto

Aikido



Morihei Ueŝiba
Fondinto de
Aikido

EL LA JAPANAJ luktartoj la plej spiritualigita estas Aikido, kiu laŭvorte signifas “La Vojon de l’ Viviga Amenergio”. Kvankam ekzistas pluraj akademioj de Aikido en Brazilo, malmultaj aikidistoj scias, ke Majstro Morihei Ueŝiba, kiu ĝin kreis en 1925, estis disĉiplo de Majstro DEGUĈI Onisaburo kaj oomotano dum sia tuta ekzistado.



La Origino de Oomoto

Unua Parto



DEGUĈI Nao
Fondintino de Oomoto

EN LA 25-a jaro de Meiji (1892) Oomoto fondiĝis far DEGUĈI Nao (1837-1918), en Ajabe, gubernio Kioto, situanta preskaŭ meze de la japana lando.

La 3-an de februaro, la 5-an de januaro en la luna kalendaro de tiu jaro, en kiu Fondintino DEGUĈI Nao atingis sian 55-jaraĝon, **“DIO UŜITORA”** abrupte posedis ŝin kaj deklaris la malkonstruon kaj rekonstruon de la mondoj materia kaj spirita. Tiel okazis la fondiĝo de Oomoto. Poste, la Dio igis Fondintinon preni tuĉpenikon kaj ŝi aŭtomate skribis la sanktan skribon nomatan Fudesaki.

La Origino de Oomoto


Dua Parto

Fudesaki

FUDESAKI ESTIS AŬTOMATE skribita de la Fondintino, cetere analfabeta, per rondaj kanaoj, kiuj montras nur la prononcon de ĉiu silabo. Post la paso de 26 jaroj tiu skribado sumis 10.000 ekzemplerojn konsistantajn el apartaj 20 japanaj paperfolioj (iom pli grandaj ol formato A-4).

Ĉi tiu Fudesaki pritraktas multajn diversajn temojn:

- la originoj kaj la destinoj de Dioj kaj ĉieluloj;
- la rilato inter Dio kaj la homo;
- la pekoj de la homaro;
- signifo de la origino de Oomoto;
- profetaĵo kaj avertoj al la homaro;
- la materia kaj spirita reformoj de la mondo;
- la celo de la homa vivo;
- la unuigo aŭ kunigo de la mondo, inter aliaj.



Peco el *Fudesaki*

La Origino de Oomoto

Trla Parto

Dio UŜITORA



Dio UŜITORA

DIO UŜITORA, KIU posedis la Fondintinon, estas rekta partospirito de la kreinto de la tuta universo aŭ la sola absoluta Dio. Li estas la reganto de la Tero, kaj kreis la terglobon kaj kreskigis ĉiun vivaĵon. Sendube Dio UŜITORA ne estas kuracisto de korpaj malsanuloj, nek profeto de atmosferaj fenomenoj kaj de aliaj begatelaĵoj; nek riparisto de horloĝoj. Li manifestiĝis pere de Nao cele al la reformo kaj konstruo de la tri mondoj: la fizika, la spirita kaj la Dia. Lia celo ne estis, cetere, banala reformo koncernata al politiko aŭ ekonomiko, sed al reformo multe pli profunda.

Fudesaki

Unua Parto

NAO KLINIĜIS ANTAŬ la papero kun peniko en la mano, laŭ la ordono de Dio, verŝajne ne post longa tempo de sia liberiĝo el la malgranda kaĝo, en 1893.

“Nao, aĉetu por Mi paperon kaj penikon. Mi skribos per via mano.” — diris Dio, detale klarigante: “dudek paperfolioj kostas 2 cendojn; unu peniko — 2 cendojn, kaj unu tuĉbastoneto — 2 cendojn.”

Kiam Nao aĉetis ĉi tiujn objektojn, laŭ Lia ordono, jen ŝi ekaŭdis voĉon: *“Frotu la tuĉbastonon!”*. *“Prenu en via mano la penikon!”* Subite ŝia mano ekmoviĝis sur la papero. Tiuj literoj estis nelegleblaj por ŝi, kiu eĉ ne ĉeestis privatan lernejon. Ŝi tamen daŭrigis la skribadon, sindonante al Dio.




Tuĉbastoneto kaj peniko

Fudesaki

Dua Parto

LA ĈAMBRO KIE ŝi skribis la Diajn Revelaciojn (Ofudesaki) estis rezervita ekskluzive por tiu ĉi celo.

Ĉiam kun puraj vestoj post sia purigado, Nao envenis en la ĉambron kaj sidis antaŭ malgranda tablo.




**Puto el kiu DEGUĈI Nao ĉerpis
akvon por purigi sin (Ajabe-Japanio)**

Fudesaki

Trla Parto

POST KELKA TEMPO kredulo rigardis al la interno de la ĉambro de Nao, tra la fendo de la malfermitaj pordoklapoj, provante vidi kiel Nao skribas la Diajn Revelaciojn. Li observis, ke la figuro de Nao ne estis milda, sed respektinda kiel tiu de vireca Dio. Oni diras, ke tiu ĉi Dio tenis penikon en la mano, en vertikala pozicio, trempis ĝin tute en la tuĉujon kaj senhalte skribis sur la papero, ĝis sekiĝo. Li do sorbigis ĝin denove en la tuĉujo kaj revenis al la skribado. Perceptante, ke ŝi estas observata, Nao milde avertis lin: *“Ĉi tiu Dio estas tiel potenca, ke sentante Sin ĉagrenita, sufiĉus al Li tuŝi la ĉagrenulon, por ke lia korpo estus ĵetita je distanco de dek metroj”*.




**Sitelo uzata de Fondintino DEGUĈI Nao por
ĉerpi akvon el la puto por sia purigado**

Fudesaki

Kvara Parto

LA BELSKRIBISTO TAN'EN Ajamura jene opinis pri Fudesaki:

“La skribo konsistas preskaŭ ĉiam el linioj de peniko faritaj kun egala premo, larĝo kaj rapido, de la unua tuŝo ĝis la fino. Tio montras, ke la skribinto estis dotita per neŝanĝebla menstato. Plej mirinde estas, ke ne nur kelkaj paperfolioj, sed ĉiuj 10.000 kajeroj havas la saman trajton. La skribado per tiel dikaj literoj estas ebla nur al kiu havas nekomunan lertecon. Ĉiu litero prezentigas saturita de spirito milda, potenca, libera, afabla kaj viva. Nobleco kaj majesteco ŝvebas tra tiu delikata kaj simpla skribaro”.



Peco el *Fudesaki*

Kelkaj paragrafoj de Fudesaki

“En la malnova Dia Regno ĉio okazis en ordo kaj pace. Poste tamen, de kiam la Diabloj konkeris la hegemonion, la mondo pereis pli kaj pli.”

“Vidu la mondon kiu venis al sakvojo; estas la fino de la besto-regno. La arbitra kaj egoisma administrado aliigis la mondon al buĉejo, kie la plej fortaj uzurpas la malplej fortajn. Forlasita al tia situacio, la mondo pereos. Por ke la mondo ne fariĝu loĝejo de homaj bestaĉoj, ĝi devos aliĝi al nova mondo per rigora purigado kaj rekonstruo” kaj por tio, “Jam estas veninta la Tempo”.

“Sed se la rekonstruo de la mondo okazos subite, la Tero neeviteble aliĝos al kota maro kaj eĉ ne tri elcentoj de la popolaro sukcesos postvivi... kio tamen neniel okazos, ĉar Mi klopodos rezervi iom da tempo por ke la rekonstruo de la mondo rezultu el la ŝanĝiĝo de la homaj koroj.”

OOMOTO REALIGAS MONDAJN aktivadojn sub la devizo:

*Unu Dio
Unu Mondo
Unu Interlingvo*



Esperanta Monumento

Unu Dio

OOMOTO ADORAS LA Grandan Originan Dion de la Universo.

Dio estas unu sola, kvankam la diversaj religioj nomas Lin per malsamaj nomoj: Jehovo, Sinjoro, Alaho.

Por Oomoto ĉiuj Majstroj estis Diaj senditoj: Kristo reprezentas la kompaton; Budho, la harmonion; Konfucio, la saĝecon kaj Mahometo la kuraĝon.

La individuoj sammaniere esprimas unu el tiuj ecoj en pli alta grado.

La nova Majstro havos ĉiajn tiajn ecojn.

Kiel diras la teozofoj, la Kristo de Amfora Erao kaj la Majtreja Budho estas la sama Majstro kiu venos prilumigi la homaron.



Kion signifas *Bankjo-dokon*?

ĈIUJ RELIGIOJ, BAZITAJ “sur vero, amo kaj bono, devenas el la sama fonto”. Ĉi tiu estas unu el la instruoj de Oomoto pri *Bankjo-dokon*. Kaj Oomoto petegas ke ĉiu religio unuanime kunlaboru kaj ne estu ekskluzivema, nek konservativa, tiel ke ĉiuj povu garantii la savon de la homaro kaj de la mondopaco. Kaj kun la celo profundigi la interreligian rilaton, ni organizas *La Tutmondan Religian Movadon*.





**Unua Forumo de Religiaj Gvidantoj
realigita en urbo Pekino en 1925**



**Diservo realigita de Oomoto en Katedralo Sankta Johano, en
Novjorko, je la 12-a de marto 1975**




Pastro Morton gvidas la kristanan Diservon "Kiso de Paco" en Ajabe (Japanio), je la 3-a de februaro 1977



14-a Delai-Lamao, en Kameoka (Japanio), je la 8-a de novembro 1980



Diservo fare de Oomoto en Katedralo Sankta Johano en Novjorko je la 29-a de majo 1982



Diservo por la Paco, Monto Sinaj, je la 6-a de marto 1984



**DEGUĈI Kiotaro kaj oomotanoj kun
Ŝejko Kuftaro en Mekko, 1991**



Forumo de Religiaj Gvidantoj okazinta en Ajabe (Japanio), 1992



**Diservo okazinta en la
Katedralo Sankta Johano en Novjorko okaze de memorfesto
de la 50-a Datreveno de Unuiĝintaj Nacioj, 1995**

Kion signifas Monda Federa Movado?



**Simbolo de Monda
Federo**

LA MONDA FEDERA MOVADO celas demokratie starigi registaron por prizorgi la mondajn problemojn per ŝanĝoj kaj klopodoj de ĉiuj landoj formantaj Ligon de Naciaro, ĉiu el ili sendependa.


Se la Monda Federo establiĝos, ĝi povos solvi internaciajn konfliktojn pace kaj senpartie; la Federa Polico, trejnita kaj rekrutita rekte de la Federa Registaro, respondecos pri la internacia sekureco, farante senutila la armilaron de ĉiu lando.

Kun plej ampleksa politika vidado, la Federa Registaro solvos sociajn problemojn (kiel malriĉeco kaj malsato) kaj partoprenos en temoj pri tumonda protekto de vivmedio, pri homaj rajtoj ktp. Tiel, ĉiuj homoj estos lokaj kaj samtempe mondaj civitanoj, kunvivante sen malegalecoj kaj ĝuante siajn fundamentajn homajn rajtojn.

En 1947 estis fondita la Monda Federa Movado (MFM), internacia organizo konsistanta el grupoj de ĉiu lando, kun sidejo en Novjorko. Nuntempe MFM konsistas el 24 landoj (krom regionaj federigintaj membroj) kiuj rajtas prezenti opiniojn kaj konsiliojn al UN. Ankaŭ partoprenas memstaraj regionaj asocioj, kiuj apogas la Mondan Federon, kaj defendas la paco-gravecon; pli ol 30 el tiuj asocioj, en 24 landoj, sin deklaris federigintaj urboj.

En Jandira ĉi tiu deklaro okazis en 1992, kaj en urbo Registro, en 1999. En Japanio, la unua urbo subskribinta tiun deklaron estis Ajabe, sekvata de Kameoka. Nuntempe estas 350 Japanaj urboj, urbetoj kaj vilaĝoj, kiuj sub decido de la Asembleo,

konfirmis aparteni al la memstaraj asocioj de Monda Federo, batalantaj cele al paco.



“La celo eviti la tutan detruon de la Homaro devos esti super iuj ajn intencoj. Tial mi defendas la starigon de Federa Registaro.”

Albert Einstein

Oomoto kaj Monda Federa Movado



DEGUČI Sumiko
(1893-1952)
Dua Spirita Gvidantino
de Oomoto

SEKVE AL DECIDO de la Dua Majstrino, Oomoto partoprenis en la Monda Federa Movado.

“Laŭ Dia projekto, la mondo estos regata de ununura reĝo, ĉar neniam la konfliktoj kaj militoj ĉesos, se ekzistos pluraj reĝoj.”

Ĉi tiu citaĵo el la Sankta Skribo de la Fondintino estas tute simila al la ideo de Monda Federo. La “ununura reĝo” povas esti komprenata kiel Dia reĝo.

La homaro fatale marŝos al pereco, se ĉiuj regnoj armile konkuros inter si, dezirante al si mem absolutan regadon, despli tiam, kiam jam ekzistas nukleaj armiloj. Se ĉiuj nacioj de la mondo federe unuiĝos, tiel ke okaze de iu ajn konflikto, ili estu submetitaj al juĝo de monda tribunalo regata de mondaj leĝoj, ili ne povos interbatali unuj kontraŭ aliaj kaj militoj iĝos nenecesaj. Ĉiuj nacioj do estos tute senarmigitaj, dum la registaro de la monda federo tenos nur kelkajn armilojn kiuj estos eventuale uzataj policecele. Kian grandan feliĉon povos ĝui la homaro, se ĝi ne plu bezonos investi nek monon nek homojn en armilaro!

Je la 13-a de decembro 1945, urbo Ajabe, laŭ decido de la konsilanta asembleo, proklamis sin *monda federiginta urbo*. Tio signifas, ke Ajabe aprobis oficiale la mondan federon, laŭ la unuanima permeso de ĉiuj ĝiaj civitanoj. Ĝi estis la unua japana urbo federiginta. La dua estis Kameoka, en 1947. Sekvis urboj Hiroŝima, Macuo, Okajama, Kanazaŭa, Kioto ktp, entute pli ol 300 urboj grandaj kaj malgrandaj, krom 28 gubernioj, kiel Okajama,

Iŝikaŭa, Kioto, Tokio, Osaka ktp, ĉiuj laŭ decido de siaj deputitoj.

Al tio kontribuis la dinamismo de la oomotanoj en pluraj lokoj, kiel bone rekonis la publiko mem. La faktoj klare montras, ke la du urboj, kie situas la du sanktaj terenoj de Oomoto, estis la unua kaj dua kiuj subskribis la deklaron. Ni estas konvinkitaj pri tio ke ĉi tiu movado havas grandan signifon.

Unu Interlingvo

Oomoto kaj Esperanto

LA CELO DE Esperanto tiel koincidas kun la ekumenismo Oomoto, ke en 1923 la kunfondinto DEGUĈI Onisaburo adoptis ĝin en la institucio. Em 1964, estis konstruita la monumento en la ĉefa sidejo en Kameoka, Japanio, kun la jenaj surskribo: “Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo”

Ekde la adopto de Esperanto, Oomoto ne nur instruas kaj disvastigas la lingvon, sed ankaŭ uzas ĝin.

En la praktiko Esperanto rolas kiel pontolingvo por traduko de la instruaj verkoj de Oomoto al aliaj lingvoj, kiel la tradukoj entreprenitaj al la portugala fare de d-ro Benedicto Silva, kaj al la hungara pere de S-ro Szabadi Tibor, nur por citi du ekzemplojn.

Oomoto jam partoprenis en 33 Universalaj Kongresoj de Esperanto, 15 fojojn karavane, inkluzive en tiuj okazintaj en Brazilo (Braziljo) en la jaro 1981, kaj en Fortalezo (Cearao) en 2002.


Kadre de tiaj aranĝoj Oomoto ĝenerale prezentas fakkunsidon kun specimenoj de japanaj artaĵoj.



“Esperanto estas tute necesa por la monda paco”

“Rilate al Esperanto, estas mia intenco nun disvastigi ĝin ne nur en nia lando, sed ankaŭ en la direkto de la lando de d-ro Zamenhof, tra Orienta Azio, tiel ke kio estis importita estu denove eksportata.”

**DEGUĈI Onisaburo (1871-1948),
Kunfondinto de Oomoto**




“Por efektiviĝi la mondan pacon, ĉiuj nacioj devas kunesti samrajte. La unua kondiĉo por starigo de ĝia bazo estos komuna internacia lingvo; ĉi tiu komuna lingvo devas esti uzata kiel la dua nacia lingvo.”

“Ŝajnas al mi ke pli frue ol ni supozas, la tempo surprizos nin, kiam la homaro aldirektos sian tutan saĝecon kaj decidos pri la vojo pensante mondscale.”

DEGUĈI Naohi (1902-1990)
Tria Spirita Gvidantino de Oomoto

Homaro!
fermu trankvile la okulojn
kaj recitu unu frazon
de ĉi tiu mondlingvo.
Kiel sonas al vi
ĉi tiu agrabla kaj paca melodio?
Sekve ĝuu la mildecon
kaj trankvilecon de via koro
Ĝuste ĉi tiu lingvo Esperanto estas Dio,
estas Dia lingvo.
Kiu povos uzi ĉi tiun lingvon
Trovos en ĝi Dion.



Majstro DEGUĈI Hidemaru
(1897-1991)

LA ESPERANTA MOVADO estas io tiel granda, ke ĝi eĉ regos la estontecon de la homaro, la feliĉon de eterne daŭraj generacioj. Tial, tiom pli necesas tempo kaj klopodo, egalaj je tiu valoro, mi pensas. Kaj tamen ankaŭ tio estas fakto, ke en nia mondo ofte okazas ke eĉ tia afero, kian oni konsideras tute nerealigebla, iam



neatendite realiĝas.

En la komenca periodo de Oomoto ofte okazis tiaj similaj aferoj. Bonvolu permesi al mi nun prezenti unu interesan el ili. Ni havas la centran oficejon kiel en Kameoka, tiel ankaŭ en Ajabe. En la sankta ĝardeno de Ajabe troviĝas lageto nomata “Kinrjuu-Kaj”. Ĉi tiu lageto estis fosita de tiamaj oomotanoj sub la instrukcio de mia praavo Onisaburo, en la jaro 1914, antaŭ ol Oomoto alprenis Esperanton. Kaj, en la lageto estis konstruitaj kvin insuletoj kiel la modeloj de kvin kontinentoj loĝataj de la homaro.

Sed, neniu sciis de kie venos la akvo. La kredantoj, kiuj fosis la lageton, fariĝis maltrankvilaj, kaj ankaŭ la urbanejoj de Ajabe eĉ duonmokis: “Kion pensas Oomoto, fosante lageton en tia loko?” Sed, en januaro de la sekva jaro, kiam finkosntruiĝis la lageto, tute neatendite venis la peto de la urbo, ke ĝi volas utiligi la lageton kiel parton de fluejo. Tiel, la lageto “Kinrjuu-Kaj” fariĝis plenplena de abunda akvo. Ankaŭ nun la lageto spegulas en si la belajn arbofigurojn de la ĝardeno.

Mi pensas, ke nia movado pri Esperanto ja similas je la laboro, nome la fosado de la lageto. Eĉ se ni restas maltrankvilaj aŭ najbaroj duonmokas, ni devas daŭrigi la klopodon senĉese kaj paciencie. Iam nepre venos la tempo, kiam Esperanto estos parolata de la homoj sur la kvin kontinentoj de la terglobo, same kiel la lageton kun kvin kontinentoj neatendite plenigis la abunda akvo.

Nu, karaj gekongresanoj, la plej grava, laŭ mi, estas tio, ke ni estu ĉiam pretaj por tiu tago, kiam neatendite okazos ke la mondo kaj la homaro bezonos Esperanton, ne nur la lingvon sed ankaŭ ĝian internan ideon. Do, miaflanke, mi estas preta diligente kaj konstante lerni Esperanton dum mia tuta vivo.

DEGUĈI Kurenai (1956-)
Kvina Gvidantino de Oomoto

Oomoto kreas Modelojn

LA OOMOTANOJ KREDAS, ke ĉio kio okazas en Oomoto sekvas laŭ Dia plano, kaj ke ĉio prezentas kaj “modelon” por io okazonta en la mondo, kaj la reflekon de aferoj jam okazantaj en la mondo. Tio konsistigas apartaĵon de Oomoto ne facile kompreneblan por la ordinaraj personoj.

La vorto “modelo” signifas, ke aferoj okazintaj en Oomoto, sendistinge pri bono aŭ malbono, fariĝas modelo, kaj speguliĝas kaj realiĝas poste en Japanio kaj en la mondo. Laŭ la vortoj de Dio, Oomoto situas en la centro de la surtera Dia Regno kaj estas ĉirkaŭvolvita de atmosfero densa kaj kompakta. Pro tio, la okazaĵoj de Oomoto, kiel forta spirita energio, disradias tra la tuta mondo laŭ cirklaĵoj kaj ili efektive realiĝas en la konformaj lokoj. Jen la mekanismo de la “modelo”.



Dua Oomoto-Afero kaj la Dua Monda Milito

JE LA FRUMATENO de la 8-a de decembro 1935 centoj da armitaj policianoj, sub ordonoj de la japana registaro, abrupte enpenetris Oomoton. Komenciĝis do la dua persekuto de la registraro kontraŭ Oomoto, la **Dua Oomoto-Afero**.

Temploj, instalaĵoj, ĝardenoj, ĉiuj sendistinge sovaĝe detruitaj de la polico: estis uzitaj kelke da miloj de dinamitoj. Eĉ la tombejo de la Fondintino, DEGUĈI Nao, ne eskapis e la detruo.



Ĉi tiu statuo el ŝtono estis detruita dum la Dua Oomoto-Afero



Foto prenita tuj post la detruo de unu el la temploj en Ajabe (Japanio)

Ne kontentaj kun la detruo de ĉiuj konstruaĵoj, la policianoj ankaŭ ekbruligis la ruinojn. Oni rakontas, ke la flamoj kaj la fumo de la rubaĵo leviĝis tra la aero dum unu monato.

Post ses jaroj de la unua atako de la **Dua Oomoto-Afero**, ĝuste je la 8-a de decembro

1941, japanaj ĉasaviadiloj ŝiris la ĉielon de Perla Haveno ĵetante tunojn da eksplodaĵoj sur la usonan mararmean ŝiparon detruante plurajn usonajn ŝipojn kaj milojn da vivoj. Tiam eksplodis la **Dua Mondmilito** en la Paca Oceano. Verŝajne la “modelo” okazinta en Oomoto speguliĝis en la mondo.

Je la 8-a de septembro 1945 la Plejsupera Tribunalo rifuzis la



**Templo Miroku-den dinamite
eksplodita, en Ajabe-Japanio**

apelacion kaj la **Dua Oomoto-Afero** estis tute solvita. **Ses jarojn poste**, ĝuste en la sama tago, nome je la 8-a de septembro 1951, Japanio subskribis la San-Franciskan Pacopakton, post la du atakoj per atombombo sur la japanaj urboj Hiroŝima kaj Nagasaki, kaj la **Dua**

Mondmilito en la Paca Oceano finiĝis. Ankoraŭfoje la “modelo” okazinta en Oomoto same realiĝis laŭ la japana situacio.

Komparu sekve allajn "modelojn" kreitajn de Oomoto

Daŭro	Dato	Evento
Ses jaroj	22-07-1934	Inaŭgurita en Oomoto la Ŝoŭta Ŝinsei-Kaj (Sankta Ŝoŭta Movado). La celo de ĉi tiu Movado estis solvi la japanan krizon kaj ankaŭ starigi sur la Tero idealan kaj nemiliteman socion.
	22-07-1940	Inaŭgurita la Taisei Jokusan-Kaj. Leĝo kiu celis la unuiĝon de la japana popolo, tiel protektante la landon dum la Dua Mondmilito.
	08-12-1935	La <i>Dua Oomoto-Afĕro</i> komenciĝis per neatendita atako de la registaro kontraŭ Oomoto.
Ses Jaroj	08-12-1941	La <i>Dua Mondmilito</i> komenciĝis en la Paca Oceano, post la atako de la japana mararmeo kontraŭ la usona Perla Haveno.
	18-04-1936	Komenciĝis la detruo de la Oomotaj Temploj fare de la japana registaro.
Ses adora Jaroj	18-04-1942	La urbo Tokio estis bombardita la unuafojon de usonaj trupoj.
	08-09-1945	La Plejsupera Tribunalo refutis la peticion kaj la <i>Dua Oomoto-Afĕro</i> estis solvita.
	08-09-1951	La Dua Mondmilito en la Paca Oceano finiĝis post subskribo de la Paco-Pakto.
Ses jaroj kaj 8 monatoj		Majstro DEGUĈI Onisaburo estis malliberigita dum 6 jaroj kaj 8 monatoj
		La japana okupacio pere de la aliancanaj trupoj daŭris ĝuste 6 jarojn kaj 8 monatojn.

Kelkaj Paragrafoj de la Diaj Revelacioj, Rilatantaj al la Modeloj

Ĉiuj aferoj okazantaj en Oomoto, Ajabe, la origina loko de Dio, okazas ankaŭ en la mondo. Ĉion Mi montras, okazigante en la origino (Diaj Revelacioj, § 235)

Oomoto estas tiu, kiu prezentas al la mondo la modelojn de bono kaj de malbono. De nun tamen Mi faros ĝin spegulo por la tri mondoj materia, obskura kaj Dia. (Diaj Revelacioj, § 306)

La internaj konfliktoj de Oomoto aperos unu post alia en la mondo. En Oomoto Mi montros la modelojn de ĉiuj aferoj, kiuj okazos en la mondo. (Diaj Revelacioj, § 366).


Oomoto, Ajabe, estas loko, tiom sankta kaj grava, ke ĝi fariĝos centro de la mondo; la aferoj, kiuj okazas en Oomoto, ĉiuj realiĝos en la mondo. Tio, kion oni faras en Oomoto, aperos kiel modelo de la mondo. Ju pli rapide neniĝos malpuraĵo en Oomoto, des pli frue la aferoj de la mondo solviĝos. Ju pli prokrastiĝos la malkonstruo kaj rekonstruo en ĉi tiu Oomoto, des pli do ankaŭ tiuj de la mondo. Kaj tiom pli longe daŭros la sufero de la garddio kaj la homaj animoj en la mondo. Estas kompatinde kaj netolereble vidi tion. Jen estas motivo, kial Mi vin tiom urĝas. Mi do rapidas plenumi la malkonstruon kaj la rekonstruon en Oomoto kaj starigi la vojon por la savo de la mondo. (Diaj Revelacioj, § 767)

La Mondo de Miroku

“DIO VENIGOS LA Mondon de Miroku, rekonstruante ĉi tiun mondon el mallumo”. Ĉi tiu estas aserto farita de Dio pere de la Fondintino DEGUĈI Nao, kaj jen precize tie troviĝas la signifo de la ekesto de Oomoto.

Miroku signifas: La plej profundan kompaton, pardonemon kaj indulgon; kaj la plej grandan amon.

La **Mondo de Miroku** estas paca kaj trankvila loko sen antagonismoj. Mondo kie kunvivas Dio kaj homoj, sed ĝia realiĝo ne estas idealigita de la homo. Ĝia efektiviĝo estas deziro de Dio.



Peco el *Fudesaki*

La Mondo de Miroku rilate al la instruoj de DEGUĈI Onisaburo

LA SANKTA MAJSTRO de Oomoto, DEGUĈI Onisaburo, registris en la verko *Rakontoj el la Spirita Mondo* la priskribon kiel estos la vivo de la homoj en la tiel revata de Dio **Mondo de Miroku**.

Se ĝenerale paroli, ĝi estos loko kie, la faranto de bono, ricevos bonon, kaj la faranto de malbono, ricevos malbonon.

La kontrastoj inter riĉuloj kaj malriĉuloj estos malpli notindaj, sed ankoraŭ ekzistos riĉuloj kaj malriĉuloj.

La bataloj inter la regantaj nacioj, la militoj inter la popoloj, la konfliktoj, estos io arkaika. Eble la armilojn por homamaso detruo oni vidos nur en muzeoj.

Nur kelkajn armilojn oni konservos cele al polica uzado, nome cele al konservado de publika sekureco.

Pordoj kun ŝlosiloj en la domoj ne plu ekzistos. Eblos dormi sen maltrankviliĝo pri tio, ĉu oni ŝlosis aŭ ne la pordon.

La priskribo farita ĝis nun estas ĝenerala elmonro de la **Mondo de Miroku**. Ni dividos ĉi tiun temon en 12 subtemojn: Loĝantaro, Politiko, Familio, Urbo, Laboro, Vesto, Ekonomio, Edukado, Energio, Vetero, Komunikado kaj Transporto. Ni kredas, ke per tiu arango la temo iĝos pli simpla al komprenado.



Majstro
DEGUĈI Onisaburo

Loĝantaro

LA KVANTO DA loĝantoj en la mondo estos je proksimume 5.670.000.000 homoj. Ĉi tiu estas oportuna nombro.

Ĝi estos socio tute memregebla, se ĝi lernos ĝuste uzi la naturrimedojn.

Ne plu estos malsato, ĉar la tuta nutraĵo povos esti kolektita el la naturo, el terkulturado kaj el brutobredado.



Politiko



Simbolo de Monda
Federo

LA TUTA MONDO dividiĝos en nuraj 12 blokoj kaj estos regata de ununura registaro, La Monda Registaro. Malsame al la nunaj tagoj, kiam surtere ekzistas ĉirkaŭ 200 kaj nenombrebla kvanto da registaroj kaj politikaj sistemoj.

La politika reĝimo adoptita estos respubliko. Ĉiuj juĝadoj sekvos la Mondajn Leĝojn, la Monda lingvo regos la komunikan scenejon inter la plej malsamaj popoloj.

Ni ne plu uzos borsajn kurzojn, kiel la nunaj ekzistantaj, ĉar estos ununura monero, la Monda Valuto.

Familio

ELSTARIĜOS LA MONOGAMIA familio.

Ĉiu paro havos meznombro 2 (du) ĝis 3 (tri) gefilojn.

Se iu mortos 90-jara aŭ 100-jara, tio estos io

neordinara, ĉar li/ŝi forpasis tre ege juna.

La vivlongeco restos ĉirkaŭ 200 kaj 250 jaroj.

Urbo



LA GRANDAJ URBOJ havos maksimume ĉirkaŭ 100.000 ĝis 300.000 loĝantojn; tute malsame al la nuna scenejo kie la nombro da homoj en superurbo superas je milionoj.

Ĉiuj urboj staros en formo de cirklo. En la centro koncentriĝos la publikaj servoj kaj en la pli foraj regionoj la loĝejoj kaj domoj.

Laboro



LA LABORO ESTOS konservata. Ĉiu homo laboros maksimume 3 (tri) horojn tage. Depende de la homo, 1 (unu) plian horon tage.

En ĉiuj labormonatoj estos 5 ripoztagoj kaj 3 feritagoj, entute 8 tagoj por ripozo monate.

Tiuj ripoztagoj povos akumuliĝi kaj esti uzataj je ununura fojo. Ekzemple, dum unu jaro oni ŝparos 96 ripoztagojn, kaj laŭvole povos libertempi dum 3 monatoj kaj 6 tagoj.

Ĉiutage oni ĝuos du manĝojn, unu matene kaj alian nokte, pro la mallongiĝo de laborhoroj.

Longaj veturadoj al laborloko malaperos. La homoj loĝos proksime de sia laborloko kaj povos piediri de la domo ĝis la laborejo.



La tago estos tiel dividita: 1/3 por laboro, 1/3 por Belartoj kaj 1/3 por Dio.

La tuta libertempo estos dediĉita al Belartoj.

Vestaĵo

NI NE PLU renkontos homojn piedirantajn surstrate kun kravato kaj kompleto. Ĉiuj uzos ion multe pli oportunan.

Nuntempe homoj uzas orelingojn tute nature; en la Mondo de Miroku la uzantoj de orelingo estos rigardataj kiel krimuloj, ŝtelistoj, nome la orelingo estos maniero identigi la malbonfarantojn, ĉar ne plu estos malliberejoj.



Ekonomio



LA EKONOMIA CIRKLO estos memsufiĉa. Reaperos la sistemo de interŝanĝo, vaste uzata en la antikveco.

Nuntempe por iu ajn kontrakto kiun ni subskribos, ni devos legi senfinan stakon da paperoj, esti tre atentaj pri la interlinioj kaj pri la esceptoj. En **Miroku-No-Jo** (Mondo de Miroku) ĉiaj kontraktoj baziĝos sur fidindeco kaj bonfido.

La homoj vivos simple kaj digne.

La monŝparo, nuntempe dezirata de la plejmulto el la homoj, ne plu havos sencon, ĉar ĉiu homo havos limon, nome ĉiuj povos akumuli nur difinitan monsumon en sia konto.

Luado de parceloj ne plu okazos. La tero estos rigardata kiel la pruntedonita de Dio. Ĉiu



homo sentos la respondecon kaj bezonon kultivi ĝin kiel eble plej taŭge.

Edukado



LA FETA EDUKADO ricevos pli da atento.

La edukado forigos la metodon ŝtopi la kapon per konoj, kaj tamen respektos la surterajn korpajn laborojn, klopodante kultivi la kapablon de ĉiu aparta lernanto.


La edukado dividiĝos en tri, ni havos la Intelektan Edukadon, La Moralan Edukadon kaj la Fizikan Edukadon.

Ĉia instruo celos dankosenton, disciplinekzercadon kaj ordon.


Antaŭ ol ĉiu studanto atingos la 13-jariĝon, lia/ŝia plej notinda kapableco, nome la fako plej alkonforma, tuj ricevos perfektigon kaj stimulon.

Ĉiuj havos kiel bazajn lernobjektojn Biografion, Geografion kaj Historion. Virinoj plejparte koncernos al edukado, ĉar estos pli instruistinoj ol instruistoj.

Inter 13-jariĝo kaj 20-jariĝo, la edukado koncernos al la fako de ĉiu aparta homo.



Energio



EN **MIROKU-No-Jo** LA tuta energio konsumita estos reuzebla, nome energio estos senfina kaj ĉia ĉi energio ne faros poluadon.

La ĉefaj energifontoj estos suna, magneta, eola (per la vento), marflua kaj el subtera varmo.

Majstro DEGUĈI Onisaburo diris, ke dum vidiĝos dratoj (dratoj de altaj tensioj kaj de telefono) sur stratofostoj, tio estas signo ke ankoraŭ ne alvenis la erao de **Miroku**.

Ĉiaj neuzeblaĵoj malaperos. Tial la kvanto da ekzistanta rubaĵo malkreskos.



Vetero




LA NUNA VETERPROGNOZO estas io, kio estas ĉiam inklina al eraroj. En la **Mondo de Miroku** tamen la veterprognozo povos esti farita sen erarebleco de iu ajn homo je iu ajn aĝo.

La klimato en tiu erao estos iom stabila. Se la naturo bezonos pluvon, ĝi venos.

Tial ni ne bezonos elhejmiĝi portante kelkajn kromlanvestojn aŭ pluvombrelojn pro la timo sperti senŝirmecon.

Komunikado

JE LA 10-A de aŭgusto 1938, okaze de la juĝo de la Dua Oomoto-Afero, la juĝisto demandis al Majstro DEGUĈI Onisaburo kia estos la estonta monda komunikado.



Jen lia respondo:

“Eĉ sub la maro estos komunikstacio.


Sub Tokio estos subtera urbo. Per nura klako sur butono ni povos ekscii kio okazas en la mondo. Per konekta skribado de iu mesaĝo, alia homo povos tuj ricevi tiun mesaĝon.

Eĉ loĝante en malgranda urbo, oni povos aĉeti vojaĝbiletan

al Parizo, ekzemple. Aperos “horloĝo-telefono”.

Kelkaj modernaĵoj cititaj de la Sankta Majstro jam ekzistas, ekzemple nun ni povas mendi flugbileton de iu ajn urbo al iu ajn loko en la mondo. Tamen ni devas memori, ke kiam tio estis dirita, 1938, tiuj aferoj estis io superreala kaj neimagleba.

Transporto



KOMPARANTE LA TRANSPORTOSERVOJN de antaŭ 30 aŭ 50 jaroj, ni observas, ke nuntempe ĉio iras pli rapide kaj facilmove.

Sed en la **Mondo de Miroku** la transporta sistemo estos io pli rapida ol tiuj nuntempaj. Aperos kuglo-traĵno kiu traveturos de Tokio al Osaka je rapido de 700km hore. Tia traĵno ne veturos sur reloj, sed ĝi ŝvebos super ilin.

Ĉiuj povos veturi al iu ajn loko en la mondo kun simpla vojaĝbileto, aĉetebla en iu ajn malgranda stacidomo, ne bezonante pli ol 3 horojn por atingi la plej malproksiman lokon.

Aperos veturilo kun 50 vagonoj kiu veturigos homojn al iu ajn parto en la mondo flugante ekster la terglobo.

Aperos alia veturilo kiu veturos sube de la tero. Ĝi ne similos al metroo kiu veturas nur kie jam estas tunelo. Tiu veturilo traboros tunelojn dum la veturado mem.

Aviadilo neniam falos. Ne plu okazos aviadaj akcidentoj.

Oni povos ĝui ĉiaj ĉi veturilojn tute senpage, ĉar la energio aŭ brulaĵoj uzataj en ĉiuj veturiloj estos donataj de Dio (aero, akvo,



sunlumo, sunvarmo ktp).

La videbla **Mondo de Miroku** estos tia. Iuj aferoj jam ekzistas en la nuna mondo, sed por ke ni havu certecon ke tiu erao alvenis ni devas observi niajn proprajn agojn kaj tiujn de aliuloj. Se la egoisma sento estos preskaŭ malaperinta kaj ĉialoke aperos la solidara sento, tiam estos veninta la **Erao de Miroku**, paca kaj trankvila erao, sen antagonismoj.





Sidejo

RELIGIA OOMOTO-ASOCIO EN BRAZIL

Associação Religiosa Oomoto do Brasil

Av. Fernando Pessoa, 211 – Vila Santo Antônio – Jandira – SP

CEP 06622-175 – ☎(11) 4707-2410 – Fakso (11) 4707-2129

www.oomotodobrasil.org.br

La urbo Jandira, kie troviĝas la brazila Sidejo de Oomoto, situas ĉ. 30km for de la Ĉerfurbo San-Paŭlo, laŭ vojo Castelo Branco.

Monata Diservo: En ĉiu unua dimanĉo de la monato, je 10:00 atm

Akcepto al publiko (spiritaj revigligaj emanaĵoj): Ĉiutage, de 8:00 atm ĝis 4:00 ptm



Sekcia Sidejo

OOMOTO SÃO PAULO CENTER

Travessa Carneiro, 6 – Liberdade – SP

CEP 01504-010 – ☎(11) 3207-1060



La Sidejo de Oomoto Internacia

Casa nº 23, do Conjunto 5, da Quadra

Interna 14, do Setor de Habitações

Isoladas Norte (SHIN) – Brasília – DF

☎(010) 55-61-368-7402

Retadreso: s-maeda@brturbo.com